



HOMOJ NI ESTAS
KAJ NENIO HOMA
ESTAS AL NI FREŝA

TRA LA MONDO IRAS FORTA VOKO
EN LA MONDO VENIS NOVA Sento
PER FLUGILOJ DE FACILAJ VENTOJ

Kulturaj Kajeroj

É. MAHÉ →

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

J A R A B O N O :

P. BABIN

Simpla : 7 fkoj \ 13, boulevard de la Chauvinière

Bonfara : 12 fkoj / 44 - Nantes

P.Č.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

NOVEMBRO - DECEMBRO

1966

6

KULTURAJ KAJEROJ

1966

Novembro - Decembro

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes

Komitatanoj :

Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

OMAGE AL HENRI MICARD

Lukto kontraŭ la malfavora sorto

Lukto favora al la Kulturo

Lukto favora al la homoj

Lukto favora al la internacia interkomprenigo.

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

pegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzojn.
Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

OMAGĖ AL HENRI MICARD

Tute speciala numero estas tiu ĉi. Ĝin ni decidis dediĉi al eminenta esperantisto, kies senĉesa laboro alportis al la gesamideanoj unikaĵon.

Kial speciala numero ?

Granda parto el la nuntempaj administrantoj de la Esperantista Kulturdomo travivis la naskiĝon de la asocio, kaj atente, preskaŭ ĉiutage sekvis la traktadoj pri akiro de Esperanto-Domo. Ili tute konscias, ke nur viro eminenta povis atingi tian realigon. Sekvante paŝon post paŝo lian laboron ili admiris lin. Ili ne ĉiam aprobis liajn decidojn sed poste konstatis, ke li pravis. Ili bone scias, ke plurfoje Micard elektis la plej malfacilan vojon ĉar li konsciis, ke nur tiun vojon kondukis al la celo. Li eĉ estis devigata fari decidojn kontraŭ amikoj kvankam tio ĉagrinis lin. En tiaj okazoj li estis tiom emocionita, ke li iĝis malsaneta. Ankaŭ pro tiuj manifestadoj de lia sentoplena karaktero liaj kunlaborantoj ŝatis lin. Ili ŝuldas al li tiun publikan omaĝon.

Kiam ili legis pri la morto de Henri Micard per la du-tri linioj aperintaj en la internaciaj revuoj, multaj esperantistoj pensis : « Henri Micard ? La fondinto de la Esperantista Kulturdomo ? Jes, granda perdo ». Tiuj du aŭ tri linioj ne povis inspiri pli al ili. Ĉar du-tri linioj ne sufiĉas por doni al la esperantistaro ideon pri la grandeco de la viro mortinta, la grandeco de liaj realigoj, la grandeco de la perdo spertita. Tion konsciis multaj, kiuj konis ne nur la kreaĵon sed ankaŭ la kreadon kaj la kreinton. Ili sentis, ke tia homo meritis pli ol mallonga anonceto. Henri Micard neniam trumpetadis pri siaj faroj. Li ankaŭ ne trumpetadis pri la Esperantista Kulturdomo, nur informante pri kio ĝi estas, kion ĝi proponas, sen blufi. Ŝajnis necese al ĉiuj, kiuj ĝuste taksis lian agadon, informi ĉiujn pri la aginto, sen trumpetadoj sed ankaŭ sen malsincera pudoro. La tuta esperantistaro ŝuldas al Henri Micard tiun omaĝon.

P. BABIN

Prezidanto de E.K.D.



En mia kastelo la esperantistoj
el la diversaj landoj sentas
ke ili estas ~~sen~~ en sia
propra lando.

Por mi estas la plej
bela rekompenco.

H. M

Lukto kontraŭ la malfavora sorto

Fine de la lasta jarcento vivis en Parizo juna paro. La edzo estis laboratorio-helpanto ĉe Pasteur Instituto. Sed ĉar lia salajro ne estis tre alta ankaŭ la edzino laboris : ŝi estis mastrumistino. La 6-an de Aŭgusto 1897 naskiĝis Henri. Liaj gepatroj, ĉar laborante ili ne povis taŭge zorgi pri li, — eble ankaŭ ĉar ili preferis por li la kamparon —, decidis sendi la bebon al la edzinaj gepatroj vivantaj en urbeto en la departemento Sarthe, apud La Flèche. Tie vivis Henri ĝis sia tria jaro, dorlotata de siaj geavoj, konanta la vivon de la vilaĝaj geknaboj.

Kvar jarojn antaŭ lia naskiĝo la Parizanoj, kiuj ĉiam bezonis pli da akvo, decidis kapti la fontojn de la rivereto Avre, ĉe la limo inter la departementoj Eure kaj Eure-et-Loir. Per akvodukto 134 km longa,

Sed knabo, eĉ kiam li ŝatas la kamparon pli ol ĉion, devas viziti la lernejon. Tion li faris en la geknaba lernejo de la vilaĝo. La instruiston, Sron Moulard li multe ŝatis kaj eĉ multajn jarojn poste li parolis pri li kun granda emocio. Bona lernanto, li trapasis la ateston pri lernado en 1908 kaj la sekvan jaron preparis ekzamenon por ricevi stipendion. Li deziris fariĝi inĝeniero kaj tiucele devis viziti parizan lernejon. Bela estonteco sin malfermiĝis por la knabo.

En januaro 1909, kiel ofte okazis, Henri akompanis sian patron kaj kelkajn liajn amikojn por ĉasado. La knabo multe ŝatis tiun sporton kiu permesis al li trairi la kampojn kaj la arbarojn. Li estis preskaŭ 12 jara kaj ŝatis esti kun la plenkreskuloj kaj



Henri Micard kun siaj gepatroj


oni ĉiutage alfluigis al Parizo la puregan akvon de la fontoj. Sed estis necese ĉiutage kontroli la purecon de tiu akvo. Pro tio oni instalas en malnova muelejo laboratorion ĉe la vilaĝo Rueil apud la fontoj. Tien oni sendis la patron de Henri, kiu de tiu tempo povis vivi kun siaj gepatroj. Tie la knabo pasigis agrablegajn tagojn en tiu kamparo al kiu li enamiĝis por ĉiam. Li sekvis la patron al la laboratorio. Li trakuris kun li la kamparon por ĉasi. Li promenis kun li laŭlonge de la rivereto kaj iniciigis je fiŝkado. Li naĝis, biciklis. Li vivis kun gepatroj nun iom pli riĉaj, la vivon de petolema, feliĉa solinfano, ĉar pli juna fratino mortis je sia dua jaro.

partopreni iliajn aktivaĵojn. Post longa, bona promenado eble laciga, ĉiuj ĝoje revenis hejmen al la vilaĝo. Antaŭ ol eniri la domon, pro prudenteco, unu el la ĉasantoj deziris malŝargi sian pafilon. Kio okazis? Henri ricevis pafon en sian dekstran genuon, kiu estis frakasita. Oni transportis lin sur la liton. Dum kvin horoj oni atendis la kuraciston, kiu devis iri kvinkilometran neĝkovritan vojon per ĉevaltirata kabriolet. Henri perdis multon el sia sango. La kuracisto faris sian eblon : purigado de la vundo, pansado. Li revenis ĉiutage sed la genuo infektiĝis kaj oni transportis la knabon al la hospitalo de Verneuil. Tie la kirurgo decidis fortranĉi la kruron, sed

nur la postan tagon ĉar la knabo estis lacea pro grandaj suferoj dum la vojaĝo sur malgata vojo. Sed la febro subite malpliĝis kaj la kirurgo prokrastis la operacion ; post kelkaj semajnoj li decidis sendi Henri al la Hospitaio de la Karitato en Parizo. La knabo estis plurfoje operaciita, sed ĉar la genu-ostaro estis frakasita, li finfine revenis hejmen, irante helpe de du lambastonoj, sin apogante nur sur la maldekstra kruro ĉar la dekstra restis faldita malantaŭen.

Tiam la famekonata Profesoro Gosset provis malfaldi la kruron kaj ĝin rektigi per deartikigo de la genuo. Sed estis necese ne ĝeni la normalan kreskadon de la gambo. La operacio estis ege riska en tiu tempo. La Profesoro multe studis kaj klarigis, kion lin intencis fari al siaj internuloj en la ĉeesto de la knabo, kiu atente kaj emociplene aŭskultis. La operacio sukcesis. Por ke la knabo povu iom distriĝi kaj iri de loko al loko, lia patro faris veturileton per biciklo-radoj. Ĉar li estis tre lacigita de la diversaj

historio-lecionoj sekvis la geografio-kaj sciencolecionojn. En 1916 en la lernejo, kie gejunuloj provis la Elementan Breveton (Ateston pri Supera Lernado), oni povis vidi viron puŝantan lamveturilon sur kiu kuŝis junulo baldaŭ 19-jara, de ekzamenanto al ekzamenanto. Henri sukcesis kaj decidis provi la Superan Breveton. La laboro ne timigis lin sed li devis lerni... modernan lingvon tute sola. Li elektis la anglan lingvon. En tiu tempo ne ekzistis la radio kaj la televido kun siaj kulturaj programoj. Li aĉetis librojn kun figura prononco kaj ĉar la vilaĝa instruistino ne plu povis helpi lin, li lernis per koresponda kurso. Dufoje li malsukcesis pro tio, ke li uzis la librojn de sia kuzino Marie-Thérèse (por eviti elspetojn) kaj la programo de la Supera Breveto ne estis la sama por la knaboj kaj la knabinoj ! Li fine kompletigis siajn konojn kaj sukcesis en Oktobro 1918 : la unuan fojon li aŭdis la anglan lingvon okaze de tiu ekzameno ! Oni tuj proponis al li instruistan postenon. Li multe hezitis ĉar lia tiama intenco estis fariĝi redaktanto en iu sekcio de la pariza adminis-



Departemento Eure

operacioj, oni devis lin veturigi al La Bourboule ĉe la montaro, kaj St-Aubin ĉe la marbordo. Sed en la maldekstra kruro, kiu devis multe labori ĉar nur ĝi funkciis, ostito sin deklaris. Novaj operacioj : malfermo de la sinsekvaj abcesoj, kuracado, engipsigado de la gambo. La nun 16-jara junulo devis resti tute senmova. La gepatroj lin instalas ekstere sur ripozseĝo, sub larĝa blua ombrello. La Profesoro diris al li, ke li ne rajtas marŝi antaŭ kompleta kreskado de lia korpo. Kiom longaj estis la tagoj ! Henri, iom muzikis per mandolino sed kun teruro konstatis, ke preskaŭ ĉiuj liaj konoj enkapigitaj dum la lerneja tempo nun forviŝiĝis. Li decidis ĉion relerni. Baldaŭ komenciĝis la Unua Mondmilito. Kvar samagaj kamaradoj de Henri memvole varbiĝis kaj la junulo suferis, ke li ne povas ilin akompani (la kvar junuloj mortis ĉe la fronto). La juna kriplulo, helpita de la vilaĝa instruistino relernis ĉion, ĉar li eĉ ne memoris la divido-mekanismon. Problemoj sekvis diktaĵojn ;

tracio. Tiam li sukcesis iri nur helpe de du lambastonoj.

Sed, dum la pasinta jaro li estis korespondinta tre regule kun sia kuzino Marie-Thérèse, lernantino en Instruistina Seminario. Li jam spertis kiom sindonema ŝi estis. Se li konsentos la proponon de la Akademia Inspektoro li havos la saman profesion kiel ŝi, la saman vivon kiel ŝi... Li konsentis kaj kuraĝe iris al Evreux, kie en la klasĉambro li iris helpe de nur unu lambastono... kaj de la klastabloj !

Jam la junulo atingis unuan venkon. Post longaj jaroj terure suferigaj, la knabo, kiu de sia 12-a jaro ne estis, kiel la aliaj, kiu subite vidis siajn esperojn forŝventintaj, kiu ne havis veran junulan vivon, kiu kuraĝe decidis ĉion relerni por kompensi la tempo-perdon, sukcesis nur per volo-forto reveni al normala socia vivo kaj eĉ, preskaŭ simbole forlasis unu el siaj bastonoj. La knabo 16-jara spitis la malfavoran sorton ; la junulo pravigis tiun spiton.

Lukto favora al la Kulturo

Henri Micard, komencanta instruisto, ne sentis sin tre kontenta en la urba lernejo. Li petis postenon en vilaĝo kaj estis sendita al Broglie, en departemento Eure, urbeto, kies nomo estas mondkonata, ĉar tie staras la kastelo de la familio de Broglie al kiu apartenas Maurice kaj Louis-Victor, famekonataj fizikistoj, kaj naskiĝloko de alia granda fizikisto Augustin Fresnel. En Broglie Henri Micard konis familian vivon ĉe la lernejestro Sro Raboisel, despli feliĉe ke la tuta salajro de la juna instruisto ne atingis la gastoprezon en hotelo ! Lia fizika stato pliboniĝis, li daŭre korespondis kun Marie-Thérèse kaj la 5-an de Aŭgusto 1919, en Noyen (departemento Sarthe), la gejunuloj geedziĝis. Nova venko por la junulo : je tiu okazo li tute forlasis sian duan lambastonon kaj iris al la urbdomo sin apogante sur promenebas-

du monatoj. Sed la patro daŭrigis sian studadon ĝis la printempo 1921, kiam, laciĝite de troa laboro li malsaniĝis : pulma lezo. Ambaŭ laboroj ĉesis, la profesia kaj la persona, kaj post resaniĝo la geinstruistoj estis senditaj al malgranda vilaĝo, kie la laboro ne estis tiom streĝiga. Tie en La Haye-Aubrée naskiĝis filino, Josette. En tiu vilaĝeto, kie la tute novkonstruita lernejo staris ekster la domaro, Henri Micard fariĝis vilaĝa administra sekretario. Nova laboro al kiu li devis alkitimiĝi sed plaĉa al li pro tio, ke li ne plus povis labori cele al instruado en liceo, kaj ankaŭ, ke li sentis sin pli proksima de la vilaĝanoj, pli bone konatiĝis kun iliaj vivo kaj zorgoj. Li ankaŭ retrovis tiamaniere iom el siaj infanĵaroj.

En 1925, gesinjoroj Micard decidis forlasi la de-



La 5 an de Aŭgusto 1919 Henri kaj Marie-Thérèse geedziĝis

tono kaj sur la ŝultro de sia edzino. Nova simbolo, ĉar la junulino, kiu morale tiom helpis la kriplulon de nun fariĝis sindonema edzino kaj helpis, ĉiutage subtenis la edzon en ĉiuj aspektoj de lia aktiva vivo, ĝis lia morto.

En Septembro la juna paro ricevis duoblan postenon en Cormeilles (alia urbeto de la departemento Eure) riĉa je Xla, XVa kaj, XVIa jarcentaj monumentoj. Henri Micard, ne laciĝebla, opiniis, ke lia venko kontraŭ la sorto ne sufiĉis, kaj decidis daŭrigi sian studadon por instrui en liceo. Dum du jaroj li tiucele studis frumatene antaŭ la malfermo de la lernejo, malfrue vespere post la profesia laboro.

En Aŭgusto 1920 naskiĝis knabo, kiu mortis post

partementon Eure kaj alproksimiĝi al siaj gepatroj vivantaj en La Flèche (Sarthe). Ili petis, pere de profesia bulteno interŝanĝantojn kaj tiamaniere venis al Epineux-le-Séguin, tiu malgranda vilaĝo kiu baldaŭ fariĝis konata en la tuta mondo. Tien, kie naskiĝis filo : Jean, ili alvenis en Aprilo 1926, La lernejo estis kaduka, tre malĝojiga post tiu bela konstruaĵo de La Haye-Aubrée. En la antaŭa posteno la du klasoj estis geaj. En Epineux-le-Séguin (316 loĝ.), knabinoj kaj knaboj estis en apartaj klasoj. Ĉiu el la geinstruistoj devis instrui 35 infanojn de ĉiuj niveloj. Ankaŭ tie Henri Micard estis vilaĝa sekretario kaj tuj laboregis zorgante pri la infanoj en kaj ekster la lernejo kaj ankaŭ post iliaj lernejaj jaroj. Plurfoje ĉiusemajne, dimanĉe, la geinstruistoj kunvenigis la postlerneĵanoj por daŭrigi la instruadon, distri ilin,

prepari festojn kaj vojaĝojn. La celo de tiuj vojaĝoj ne estis tre malproksima pro tio, ke mankis la financaj rimedoj sufiĉaj; sed tiuj junaj vilaĝanoj tiuokaze vizitis la marbordon nordan aŭ okcidentan, la unuan fojon en sia vivo. Multaj el ili eĉ la unuan fojon tiamaniere uzis la trajnon. Post kelkaj jaroj la vojaĝantoj povis pasigi plurajn tagojn ĉe la marbordo! Tion la paro Micard povis fari dank'al la financa profito de la festoj. Sed imagu, kiom da laboro postulis la preparado de tiuj festoj: elekti taŭgan programon, pretigi ofte mallertajn vilaĝanojn por prezentado de kantoj, dancoj, teatraĵoj. Oni devis fari la kostumojn, la dekorojn. Ne ofte gesroj Micard enlitiĝis je taŭga horo. Sed per tiu laboro ili atingis duoblan, por ili tre gravajn celojn: per la mono enspezita ili ne nur distris kaj pluinstruis la geknaboj sed ankaŭ iomete modernigis sian malnovan lernejon per aĉetado de materialo (en 10 jaroj tute ŝanĝiĝis la meblaro), kaj eĉ pli grave: la geinstruistoj tiel pli proksimiĝis al la vilaĝanoj, akiris ilian estimon, ilian simpatian, ilian fidon.

ke estus pli taŭge apartigi la infanojn ne laŭ ilia sekso sed laŭ ilia aĝo en du geaj klasoj, Sro Micard instruante la pli aĝajn geknabojn kaj Sino Micard la malpli aĝajn. Sed ilin konstruistaro la tradicio reprezentita de la paroĥestro, kaj de la episkopo: knaboj kaj knabinoj ne sidu sur la samaj benkoj!

Sed la geinstruistoj estis subtenitaj de sia administracio. La geigo efektiviĝis. La episkopo decidis, ke ne plus okazos diservoj en la preĝejo (ĉe ne por la geedziĝoj, baptaj kaj enterigoj). La kultantoj devis iri al vilaĝo 5 km malproksima kaj riproĉis la geinstruistojn, kiuj ne cedis ĉar ili sciis, ke pli bona estos la instruado. Dum ses monatoj daŭris la kverelo kiu foje fariĝis preskaŭ revolucio (la prefekto proponis sendi al Epineux-le-Séguin ĝendarmojn por protekti gesroj Micard). Post tiu tempo ordo revenis kaj la vilaĝanoj povis denove kulturi en la preĝejo. La batalo finiĝis dum kiu Henri Micard, certa je sia praveco, neniam cedis. La kontraŭstaro ne timigis lin pli ol la malsano.



La domo de Gesroj Micard

Henri Micard ne kontentiĝis per tiu profesia agado. Li ankaŭ helpis la plenkreskajn vilaĝanojn per sia laboro en la administrado de la vilaĝaj aferoj kiel sekretario kaj ankaŭ persone. Ne pasis unu tago, kiam li ne ricevis la viziton de kelkaj samvilaĝanoj je la ajn horo por informoj pri iu aŭ alia problemoj kiu postulis lian kompetentecon. Li tre ofte, post la laborhoroj iris al iu malproksima farmo por praktiki injekton al malsanulo aŭ eĉ por vindi mortinton.

Sed Henri Micard sciis ankaŭ malkontentigi la vilaĝanojn kiam li konsciis tian neceso. En tia kazo li batalis, ne cedis ĝis la tempo kiam la hieraŭaj kontraŭuloj fariĝis denove amikoj. Jen trafa ekzemplo. En 1936, gesroj Micard, kiuj ĝis nun, devis apartigi la knaboj de la knabinoj en du diversaj klasoj (en ĉiu klaso ĉeestis infanoj de 6 ĝis 12 jaroj), pensis

Ek de tiu jaro 1936, Henri Micard utiligis la Freinet-metodon pri instruado. La presado de siaj propraj « liberaj tekstoj » multe plaĉis al la infanoj, kiuj aperigis gazeton, kiu estis sendita al ĉiuj familioj kaj en 1939-40 al ĉiuj soldatoj el la vilaĝo. Jam de longe (1925) Henri Micard prezentis filmojn edukajn en la lernejo. La unua en la departemento, li tiamaniere lernigis al siaj ĝeneralantaj historion, geografin kaj sciencoj. Kompreneble li funkciigis la aparaton per la mano, kaj laŭtlegis la klarigojn.

La jaro 1941 vidis la ĉesigon de tiu laboro dediĉita al la geknaboj kaj iliaj gepatroj de la vilaĝo Epineux. Pro sia sinteno, Henri Micard estis sendita al alia vilaĝo. Sed danĝero ŝvebis super lia kapo: la tiama registaro intencis lin senoficiigi. Informite de la inspektoro, kiu sciis kiom valora estis la ins-

truisto kaj admirinda la homo, Henri Micard preferis emeritiĝi. Li prezentis medicinajn atestilojn (ĉar li fakte estis malsana) kaj la administracio konsentis pri lia emeritiĝo. Li iris al Nantes, kie Sino Micard ricevis postenon. Sed la materia aspekto de la familio ne prezentigis favora : tri infanoj (en 1935 naskiĝis dua filino : Janette), neniu loĝejo, unu salajro kaj ege malalta pensio ne estis entuziasmigaj faktoroj en vivo dum milita tempo. Henri Micard trovis asekuran oficon sed malgravan ĉar li ne povis disponi grandan sumon por la aĉeto. Per sia kriplula veturilo li trairis la urbon por enkasigi la kvitancojn sed ne estis sufiĉe altrudema por varbi novajn klientojn. Ne tre longe daŭris tiu vivo. Kiam Nantes estis la unuan fojon bombita, ĉiuj infanoj kaj gemaljunuloj kaj kripluloj estis evakuitaj el la urbo al alia departemento. La akceptanta departemento estis Mayenne kaj tiamaniere Henri Micard denove trovigis en Epineux-le-Séguin, kie li vivis ĝis la liberigo de la lando. En 1945 li petis sian reoficigon. La Akademia Inspektoro proponis al li postenon en la ĉefurbo de la departemento : Laval. Henri Micard rifuzis dirante : « Oni min forpelis el Epineux. Mi petas mian reoficigon en Epineux ». La Inspektoro montris al li ĉiujn avantaĝojn de posteno en la urbo Laval. Sed Henri Micard ne akceptis kaj fine revenis instrui kun Sino Micard en Epineux.

Kaj li tuj reaktivigis. Ne nur kiel instruisto sed ankaŭ kiel edukisto de la ĝejnuloj post la lernejaraj kaj ankaŭ de la aliaj vilaĝanoj. Sed kion fari en ankoraŭ malfacila postmilita periodo, sen mono, en vilaĝeto. Io povas ofte anstataŭi la monon : la difino de preciza celo kaj la volo batali ĝis la atingo de la celo. En 1947, Henri Micard decidis krei vilaĝan kulturdomon (Foyer rural) kie estos prezentitaj al la vilaĝanoj teatraĵojn, filmojn, prelegojn. Li mem klarigis la kialon de tiu fondado, okaze de elektado. Li skribis : « Post la Liberigo de nia lando, la tiamaj registoj instigis nin al kreado de postlernejaj organizoj. Mi povis krei « Laikan Amikaron » sed mi timis, ke mi ofendos kelkajn personojn en mia vilaĝo kiu feliĉe ne konas lernejan konkuradon ; ĉar mi deziris akordigi, unuigi ĉiujn, mi elektis « Vilaĝan Kulturdomon » kiu, dank'al sia plena neŭtraleco povas ebligi la kunigon de ĉiuj bonvolemoj. Mi faris tion por eduki kaj distri ĉiujn vilaĝanojn, kiu ajn estu iliaj opinioj aŭ kredoj ».

Ambicia projekto realigota sen financaj rimedoj, sen kunvenejo. Ekzistis la antaŭa knabina lernejo, malnova, kaduka konstruaĵo. La vilaĝestraro konsentis disponigi ĝin al la instruisto sed rifuzis ĉian

helpon. Henri Micard sukcesis entuziasmigi grupon da ĝejnuloj (kaj aliaj vilaĝanoj), kiuj konsentis labori post sia labortago. Vandoj estis faligitaj, la malnovaj pavimoj anstataŭigitaj de ligno-plankoj. Oni skrapis, masonis, gipsis, pentris. Oni konstruis scenejojn, kulisojn. La malnovaj lernejaraj tabloj transformiĝis en benkojn... iom malmolajn ! Kaj baldaŭ ekzistis en la departemento Mayenne, en unu el la plej malgrandaj vilaĝoj, la unua Vilaĝa Kulturdomo. Sed ne sufiĉis la loko. Oni bezonis materialon ĉefe kino-aparaton. Kooperativa asocio estis kreita kun akcioj. Sed ĉar estis necese tuj komenci la aktivadojn, ĝesroj Micard pruntedonis la sumon necesan por la aĉetado de la aparato. Por reenspezi tiun sumon, la ĝeinstruistoj prezentis filmojn en tri diversaj vilaĝoj. Tio signifis rapidan vespermanĝon, ŝarĝon de la peza aparato en la automobilon, veturadon sur la mallumaj, kelkfoje malglatitaj vojoj kaj revenon malfruan, plurfoje ĉiusemajne. Tio signifis kalkulojn, ĉar por pligrandigi la enspezojn, Sino Micard vendis bonbonojn kaj trinkaĵojn al la ĉeestantoj. Sed, spite la laciĝojn, ĝesroj Micard estis kontentaj ĉar ili sciis, ke tio estas utila, ke almenaŭ dum tempo en la semajno vilaĝanoj taŭge distrigis. Ili sciis, ke tiu laboro alportas monon al la kaso de la vilaĝa kulturdomo, kiu bezonis ĝin por sia ampleksiĝo. Spite mankon de helpo fare de la instancoj, la Vilaĝa Kulturdomo kreskis. Tien venis unu, dufoje en la semajno, ĝejnuloj por provludi, konstrui dekorojn, fari scen-kostumojn, diskuti pri la programo de la aktivadoj, ĉeesti prelegon, rigardi filmon. Kiom fieraj ĉiuj estis kiam ili aŭdis, aŭ legis en gazeto, ke tia kulturdomo, kia ilia, estis malofte trovebla en malgrandaj vilaĝoj (eĉ en pli grandaj). Ili estis tre dankemaj al ĝesroj Micard, kiuj, plie, ĉiujare organizis vojaĝon al iu vizitinda loko de la regiono. Tiom feliĉaj estis ankaŭ la ĝeinstruistoj pro la rezultoj atingitaj, ke post sia emeritiĝo en 1952, ili daŭrigis sian laboron en tiu medio, kvankam ili tiutempe ankaŭ « surŝultrigis » la mastrumadon de la Esperantista Kulturdomo. Ĉar ili trovis, meze de tiuj vilaĝanoj, atmosferon de ili ŝatatan kaj ili estis certaj daŭrigi batalon valoran : tiun de kulturo.

Ankoraŭ pli grava montriĝis post lia morto la laboro farita de Henri Micard, kiam prezentigis al la daŭrigantoj problemojn antaŭe solvitaj de la ĉefgvidanto. Ĉiuj ankoraŭ pli klare komprenas, kia homo Micard estis. Dank'al Sino Micard kaj grupeto de antaŭaj kunlaborantoj, la afero daŭras ĉar neniu en la vilaĝo opinias ebla la malaperon de tia kreitaĵo. Ili dediĉas sian laboron al la memoro de la malaperinta kreinto.

LUKTO FAVORA AL LA HOMOJ

La antaŭa ĉapitro montris, ke Henri Micard ne konsideris limiga sian profesion kaj ankaŭ helpis la homojn ekster la lernejo, en la vilaĝo. Sed ankaŭ ekster la vilaĝo, ekster la departemento li agadis.

La instruisto Micard opiniis sian profesion tre grava ĉar la estonteco de la mondo, de la homo fontas el la lernejo. La respondeco de la instruisto estas granda. La infanon oni ne premu per tutepretaj ideoj, sed oni donu al li la bazajn konojn kaj la rimedojn juĝi tiamaniere ke fariĝinte homo li ne estu instrumento uzita de iu aŭ alia grupo socia, politika aŭ religia sed elektu mem sian sintenon en la vivo. Nur per kulturo la homo povas atingi liberecon. Instruado estas tro grava por esti la afero de iu ajn, ie ajn, iam ajn. Oni devas serĉi la plej bonajn instrumentojn, adapti ilin al la evoluo de la mondo, al la celo atingota. Por tio la instruistoj devas grupiĝi en profesiaj rondoj kaj defendi la rajtojn de la infanoj al kulturo. Ili ankaŭ devas peti, se necese postuli, kondiĉojn favorajn al tia instruado. Por tio Micard tre frue aliĝis al sindikato kaj, ĉar li opiniis, ke kulturo disradiu ekster la muroj de la lernejo al tiuj, kiuj ne havas la eblon plukulturiĝi, li ankaŭ aliĝis al kulturaj asocioj. Sed Micard ne povis esti nur ano de grupo. Ĉar li eniris asocion por precizaj opinioj, li tuj defendis siajn ideojn en tiu asocio. Li neniam estis nur « ĉeestanto » sed « partoprenanto ».

Ek de siaj unuaj profesiaj jaroj, Henri Micard aliĝis al la « Unueca Sindikato ». Li tuj aktivis, ne hezitis publike diri sian opinion eĉ antaŭ kontraŭuloj. En 1924 antaŭ 500 sindikatanoj el kiuj multaj konsilis al li prudentecon, li defendis la « saman salajron por ĉiuj instruistoj », malnovaj aŭ novaj. Li opiniis tion justa kaj por tio sentime diris tion al ĉiuj. Poste, ĝis 1954, li estis unu el la administrantoj departementaj de la Nacia Sindikato de la geinstruistoj, kaj dank'al li la kunvenoj estis ĉiam vivoplenaj ĉar li ne konsentis, ke multaj sindikatanoj estis nur kotizantoj. Kaj li provis skui la ne sufiĉe agantajn gekolegojn kaj entuziasmigi ilin. Unu tagon, nacia respondeculo venis al departementa asembleo. Li deziris saluti Micard sed ne konis lin. Kolego diris al li : « Vi ne eraras. Micard estas tiu, kiu plej laŭte protestas. » Eĉ kiam li ne plu respondecis pri la sindikato, li ĉeestis ĉiujn kunvenojn kaj ĉiam laŭte diris sian penson.

Kreinto de la « Vilaĝa Kulturdomo » de Epineux-le-Séguin, li ankaŭ interesiĝis pri similaj aktivaĵoj sur la departementa tereno kaj estis administranto de la departementa sekcio de la « Fédération des Œuvres Laïques » (F.O.L.). Lia tiutema laboro estis oficiale rekompensita per atribuo de medalo okaze de la centjara datreveno de la Franca Liko por Instruado. Li ĉiam estis tre atente aŭskultata kaj oni petis de li konsilojn eĉ el aliaj departementoj. Kiam, jam malsana, kaj ne kapabla agi kiel antaŭe, li deziris ekŝiĝi, liaj kolegoj rifuzis. Ĝis sia morto li daŭre estis unu el la gvidantoj de tiu asocio kaj eĉ el sia lito interesiĝis pri ties aktivaĵoj.

Henri Micard deziris kontribui al la feliĉo de la homoj ĉefe de tiuj, kiuj malfacile perlaboras sian ĉiutagan vivon, ne ĉiam ricevante ĝustan kompenson de sia laboro. Li interesiĝis pri ĉiuj formoj de tiucela batalo kaj ankaŭ pri politiko. Tuj post la disigo de

la socialista partio en Tours, li aliĝis al la Komunista partio. Sed ĉar li ne tie trovis la tute liberecan etoson al li necesan, li aliĝis al la socialista partio. Ankaŭ sur la politika tereno li estis batalanto. Li organizis kunvenojn, kontraŭdiris la politikajn kontraŭulojn okaze de iliaj publikaj kunvenoj. Ankaŭ tiuokaze li montris la maljustaĵojn kaj la malverojn.

Sed li ne partoprenis la politikan batalon nur por defendi ideojn. Por Micard ideo valoris ne nur per si mem sed eĉ pli valoris kiam oni ĝin povis konkretigi. Li ĉefe estis agemulo, realiganto, organizanto. Por tio li provis apliki siajn ideojn en sia vilaĝo mem. Li jam multe faris favore al la individuoj. Sed li deziris fari ion, ankaŭ favore al la vilaĝanaro. Tiucele estis necese, ke li fariĝu vilaĝa magistrato. Tion li provis, kaj unufoje sukcesis. Nur unufoje, kio ŝajnas stranga tiom granda estis lia sindonemo. Sed en vilaĝetoj, oni ofte malfidas la progresemulojn eĉ se oni profitas iliajn farojn. Kion Henri Micard deziris fari per sia eventuala partopreno en la administrado de la vilaĝo ? Ni lasas al li la parolon, dominante liajn proprajn skribaĵojn, kiuj montras kia estis la homo : « Por tion realigi, necesas granda bonvolemo kaj komprenemo. Por ke realiĝu projekto ne sufiĉas kvaronhora preparolo en kunveno. Oni ĝin studu ĝisfunde. Oni ĝin pridiskutu, kun ĉiuj specialistoj. Oni incitadu la administraciojn. Unuvorte oni laboru, laboru kune. »

Micard ne provis kaŝi siajn opiniojn kiuj ne plaĉis al multaj vilaĝanoj. Li eĉ substrekis ilin : « Mi estas laikulo, ĉar mi neniam forgesis la vilaĝan publikan lernejon kiun mi faris min homo respektanta ĉiujn kredojn kaj opiniojn. Mi estas socialista ĉar mi profunde opinias ke la socialistaj solvoj alportos al la malkapca mondo pacon kaj feliĉon. »

Ankaŭ en tiu agado sindikata kaj politika multe helpis Sino Micard. Ĉar gesroj Micard ne lasis la laboron al la aliaj (li eĉ parte konstruis sian domon !). La kelkaj vesperoj pasigitaj hejme ne estis dediĉitaj al riĝo. La skribomaŝino estis alportita sur la tablo. Micard tajpis stencilojn por cirkuleroj. Poste funkciis la hektografilo. Sino Micard kolektis la cirkulerojn kaj ilin metis en kovertojn por, ke ili estu sendataj la postan tagon. Eventuale dum la ferioj ankaŭ helpis la infanoj.

En 1959 okaze de elektado, Micard skribis sur la bulteno sendita al ĉiuj balotantoj : « Mi estas 62 jara : multaj zorgoj min superŝutas ; mi do havas neniun ambicion krom la deziro decidi miajn lastajn jarojn al servado al miaj samvilaĝanoj ». Kaj fakte, ekstere de la vilaĝo estraro, li servis. Kaj Sro Guillot, reprezentanto de la Akademia Inspektoro, tute prave diris apud lia tombo :

« Jes, Sro Micard, vi utile laboris ; vian mision vi plenskusece plenumis, kaj sur la homa vojo vi postlasis spurojn, kiujn la postvenantoj certe sekvos. La ĝantoj de tiu vilaĝo al kiu vi dediĉis viajn fortojn kaj kiuj hodiaŭ manifestas sian dankemon, via kolegaro, kiu per sia ĉeesto montras sian estimon al vi, la infanoj de Epineux, kiuj ankoraŭ longtempe profitos per via sindonemo, ne forgesos. »

Jes, certe, ankaŭ ili ne forgesos vin, Micard.

Lukto favora al la internacia interkompreniĝo

La tuta aktiveco de Henri Micard celis progresigon de la homo al feliĉo. Sur la politika kampo li pensis, ke ĉiu homo devas ricevi ĝustan parton el la profito donita de lia laboro. Sur la sindikata kampo, ke oni devigu la respondeculojn doni al la instruistoj ĉiujn eblojn taŭge praktiki sian tiom gravan profesion kaj al ĉiuj infanoj similajn okazojn utiligi siajn kapablojn. Sur la instrua kampo, ke oni devas prepari la infanojn, per metodoj plej taŭge adaptitaj al ĉiuj karakteroj, al sia rolo en la socio, al sia homa rolo, kiu baziĝas sur komprenemo, justeco, respekto al ĉiuj sinceraj kredoj.

Tiuj ideoj devenantaj de profunda amo al la homoj, kondukis lin al Esperanto, ĉar li tuj sentis, ke per internacia, neŭtrala lingvo, la homoj pli facile (ĉar rekte) interkomprenus unu la alian, ne blinde akceptante kion oni diras al ili pri la aliaj. Pro tio, ek de la jaro 1921, li sekvis parolan kurson gvidatan de Sro Echenbrenner en Sablé, 13 km. de Epineux. Li regule iris al Sablé kaj partoprenis en la vivo de la Esperantista Grupo de tiu urbo, sed nur en 1934 li mem gvidis kurson en tiu urbo. Samtempe li vigligis la Esperantistan rondon per vojaĝoj eksterlanden kaj akceptado de eksterlandaj grupoj.

La saman jaron en Lesconil (Bretonujo), instruisto, Sro Bourguignon organizis « Someran Lernejon » por la geinstruistoj dezirantaj lerni aŭ praktiki la internacian lingvon. Micard ĉestis tiun Someran Lernejon. La loko elektita por la sekvantaj Somera

Lernejo estis « Le Cap d'Ail » sur la Lazura Marbordo. La sukceso de tiu studperiodo estis tiel granda, ke la ĉeestantoj opiniis ke Sro Bourguignon sola ne povas organizi la sekvantajn. Estis do decidite starigi specialan asocion : « la Grupo de Esperantistaj Edukistoj ». La prezidantino estis Jeanne Dedieu, kiu ankoraŭ, en 1966, okupas tiun postenon, kaj intertempe fariĝis prezidantino de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Ĝenerala sekretario fariĝis Micard. Unu el la taskoj de la ĝenerala sekretario estis la organizado de la Someraj Lernejoj. La unuan li organizis en La Tranche-sur-Mer, en la departemento Vendée. Granda estis la laboro, kiu komenĉis jam dum Pasko : vizito de la urbestro, la lernejestro, la hotelestroj. Multaj instruistaj gesamideanoj venis en La Tranche-sur-Mer. La kursoj estis diligente sekvataj kaj la maro tre bonveniga. Okazis ankaŭ kunvenoj, okaze de kiuj oni multe diskutis, kelkafoje tre laŭte. La loĝantoj de la marborda urbeto ofte vidis la viglan aron kaj kompreneble la verdan stelon. El la multaj, diverstemaj diskutoj eliĝis la konvinko, ke ne sufiĉas nur unu Somera Lernejo, ĉar multaj estis la partoprenantoj kaj ne estis facile ĉiujn loĝigi, kaj ĉar kelkaj preferis la marbordon sed aliaj la montaron aŭ la kamparon. Pro tio ĝis 1939 okazis ĉiujare du Someraj Lernejoj : en 1937 : denove La Tranche-sur-Mer, kaj Sallanches (en la Alpoj) ; en 1938, Erquy (sur la ĉanela Bretonia marbordo) kaj Poissy (apud Parizo) ; en 1939 : Pornichet (Atlantika marbordo) kaj Gerardmer (Vosges). Kaj konsekvence la laboro de la organizanto duobligis. Tuj post la finiĝo de la somero, Micard devis



pensi pri la sekvonta kaj kontakti, urbestrojn, lernejestrojn kaj hotelestrojn en diversaj urboj, sciigi la rezultojn al la konsilio de GEE, propagandi la studperiodojn, sendi informojn al la interesatoj, ktp...

1939 — Dua mondmilito — La tiujaraj Someraj Lernejoj fiaskis. La esperantistaj aktivaĵoj en multaj landoj ĉesis aŭ estis ĉesigitaj. En Francio mem esperantistoj estis arestitaj, deportitaj. Multaj mortis aŭ estis mortigitaj. Sed ek de la Liberigo de la lando en 1945, GEE reviviĝis kaj tuj, komisiite de la estraro, Micard organizis la unuan postmilitan

mont ; 1948 : La Rochelle ; 1949 : Angoulême kaj Granville ; 1950 : St-Germain (apud Parizo). Sed en la printempo 1951, Micard trovis nenion urban por akcepti la venontan Someran Lernejon. La malfacilaĵo estis trovi ĉiujare novan lokon. Kial ne havi definitivan lokon? Precize, en Sablé, estas vendota granda domo. Tiu estas la solvo. Sed kiel ĝin aĉeti? Micard tuj sin turnis al ĝeamikoj kaj la multobligilo funkciis. En la unua cirkulero aprobita de la GEE estroj tiamaj : Fino J. Dedieu, Sroj Debande, Thébaut, Bidoit kaj Boyet, sendita al 100 esperantistoj Micard skribis : « La organizado de somerlernejo estas pli kaj pli malfacila ĉar ni ne



Micard en Grésillon

Someran Lernejon en Sablé-sur-Sarthe. Sed pli kaj pli malfacila estis la organizado de tiaj renkontoj pro diversaj kialoj : la marbordoj estis parte malpermesitaj pro danĝero prezentita de bomboj ankoraŭ kuŝantaj en la sablo, en la arbaroj aŭ en la blokhaŭsoj ; plie multaj el la marbordaj vilaĝoj aŭ urbetoj estis parte detruitaj ; la lernejoj en la kamparo kaj montaro estis ofte utiligitaj dum la somero por akcepti infanojn el la urboj ; la prezoj en la hotelejoj estis tro altaj por la salajro de la instruistoj. En 1946 okazis la Somera Lernejo en Sassenage en la Alpoj ; 1947 : denove Sablé-sur-Sarthe kaj Bel-

disponas pri domo *posedata de ni...* Tiu hodiaŭa sonĝo povas fariĝi morgaŭa realo. Por tio sufiĉas ke kune ni volu... Nuntempe estas vendota en Sablé bieno, kun domo kiu povas loĝigi proksimume 50 personojn... Ni povus trovi lokon pli favoran ol Sablé. Sed estas necese, ke proksime loĝu esperantisto konsentanta labori por krei tion, kion ni deziras. Mi esperas esti pensiulo post unu jaro. Eble mi povos vivi la necesajn jarojn por starigi kaj firmigi tiun aferon... Sufiĉas ke 600 esperantistoj pruntedonu po dek mil frankojn (tiamaj) por ke ni disponu pri la ses milionoj necesaj. (Sekvis plano de



Ge-sroj Micard provas trovi
liberan ĉambron por jusalveninto

organizado de asocio)... Ĉu tia afero povos vivi kaj prosperi. Mi opinias jese... » En tiu unua cirkulero oni trovas la tutan homon Micard. Li opiniis necese fari ion. Li tuj decidis provi kaj ne proponis « nu-bojn » sed faris klarajn proponojn. Li eĉ trovis la deĵoranton : sin mem (kaj kompreneble, Sinon Micard) ; li kuntrenis bonvolemlulojn nur ĉar li mem donis ekzemplon. Li estis preta sin dediĉi al la proponitaĵo.

La respondoj estis multaj kaj kuraĝigaj. Sed la tiujara somera lernejo povis okazi nur dum II tagoj en Houllgate dank'al la helpo de ne-esperantista amiko de Micard. Urgis la realigo de la « sonĝo ». La 16-an de Septembro kun nur iom pli ol unu miliono en la provizora kaso, asocio estis leĝe starigita en Parizo. Ĝi ricevis la nomon « Kulturdomo de franclandaj Esperantistoj ». La estraro konsistis ĉefe el GEE-anoj kaj Micard estis la Prezidanto. La celo de tiu Asocio estis : aĉeti domon, bienon, materialon disponigotan al la Esperantistoj por iliaj renkontoj, distriĝoj kaj kulturigo.

La unua paŝo estis irita. La estonteco ŝajnis sennuba.

SED... Dumtempe vendiĝis la domo en Sablé.

Alia vendota domo ekzistis apud Sablé, en urbeto Brûlon. Sed ankaŭ tiu espero vantiĝis. Nova cirkulero estis sendita al la konsilianoj de la nova asocio. Ĉu Micard malkuraĝiĝis? Tion pensus, kiu ne konis lin. « Mi ne kutimas longe insisti pri la pasinteco, kaj laŭ mia penso Brûlon estas jam pasinteco... Mi devas viziti la 18-an de Oktobro du kasteletojn : la unuan je du kilometroj de Baugé ; la alian en Baugé mem ».

La 19-an de Oktobro ¹⁹⁰⁰ nova cirkulero per kiu Micard sciigis, ke li vizitis la Kastelon Grésillon : regiono agrabla, bone situata ; kastelo belaspekta sed sen elektra lumo nek akvo en la ĉambroj ; ĉio estis ebla por la estonteco ; sufiĉus ke oni trovu ankoraŭ unu milionon (kiun oni bedaŭrinde ne trovis).

Tiu manko de mono estis grava malhelpaĵo kaj deĉigis Micard fari multajn vojaĝojn al Baugé por provi havi pli favorajn kondiĉojn. Estis necese apartigi la bienon en du partojn ĉar la tuto estis tro multe kosta. Fine interkonsento atribuis al la Kulturdomo 8 hektarojn kun la konstruaĵoj por tri milionoj, kaj la 4-an de Novembro estis oficiale subskribita la interkonsento. Tuj estis pagitaj 1.500.000 fk. La cetera sumo estis pagota en tri par-

toj ĝis la 1-a de Decembro. Kaj la asocio ne posedis la tutan sumon !

Ve ! La posedantino sciigis, ke ŝi deziras ricevi la sumon tuj. Ne eblis ! Sed Micard ne rezignis. Li trovis lignovendiston, kiu konsentis aĉeti la tutan bienon, kaj revendi parton al la asocio. La batalo pri la arboj atribuataj al la arbovendisto aŭ al la Kulturdomo fariĝis ankoraŭ pli akra. Fine la du « batalantoj » akordiĝis : la arbovendisto vendis la konstruaĵojn kaj 8 hektarojn por 3.000.000 fk. Estis eble tuj pagi 2.000.000, pli malfacile pagi la ceteran milionon antaŭ la fino de decembro. Restis nebula la rimedo pagi la impoŝtojn kaj malkleran procentaĵon (750.000 fk) je la fino de Januaro ! Nova alvoko estis farita. Kaj dank'al « skrapado de la interno de la tirkestoj » la kastelo Grésillon fariĝis posedaĵo de la « Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj ».

Granda batalo estis gajnita de Micard. Li ĝojis pro tio, ke « de nun la esperantistaro havos sian domon ». Li multe klopodis por atingi tiun celon, sciante ke de tiam komenciĝis nova etapo, kiu estos fonto de novaj zorgoj. Dank'al li la asocio estis posedanto de belega konstruaĵo... tiel malplena kiel la kaso. Car neniam troviĝis la 600 esperantistoj, kiuj per sia helpo povus ebligi la necesajn aranĝojn : instaladon de akvo kaj elektra kurento, aĉetadon de litoj, litukoj, kovriloj, tabloj, manĝilaro, kuirilaro, ktp...

Per instigo de Micard, kelkaj bonvolemuoj venigis la elektran kurenton en la ĉambrojn dum Pasko. Kelkajn semajnojn poste estis eble sammaniere venigi la akvon kaj fiksi la lavujojn.

Sed ĉu estos eble malfermi la kastelon dum la somero ? Tiun demandon multfoje faris al si Gesroj Micard. La alvokojn al financa helpo sekvis alvokoj al prunto de materialo. Kaj en Aŭgusto 1952, la unuaj vizitantoj alportis siajn litukojn, kuŝis en

litoj pruntedonitaj de la direktoro de proksima lernejo, uzis la meblaron kaj manĝilaron de Gesroj Micard ! Cent kvindek personoj vizitis la kastelon, kaj Micard povis skribi : « Mi povas aserti nun, ke la funkciado konfirmis la plej optimismajn esperojn ; la enspezoj permesos pagi la ordinarajn elspezojn de la tuta jaro ». Li forgesis diri, ke tiun rezulton oni povis atingi ne nur per la ĉesto de 150 gesamideanoj, sed ankaŭ dank'al lia granda sindonemo kaj la sindonemo de Sino Micard, akceptantino, kuirstino kaj servistino !

Dank'al loterio, la Kulturdomo povis aĉeti en 1953 sian propran meblaron. Sed mankis komforto kaj multaj personoj kiuj ne komprenis, kia grandiozaĵo jam estis la malkomforta kastelo, akre plendis... kaj neniam revenis.

La vivo de Gesroj Micard estis de tiu jaro 1952 grandparte dediĉita al la pluvivado, al la komfortigo de Grésillon. La laboro farota estis grandega. Ĝi bezonis ne nur sindediĉon sed ankaŭ entuziasmon ne difekteblan de la riproĉoj aŭ malhelpaĵoj, diplomatecon en la nemalhelpablaj diskutoj, eĉ kvereloj. Estis necese ke la vojo sekvota estu klare difinita kaj senmanke irata. Estis necese malplezurigi tiujn, kiujn ne vidis la larĝan fosajon inter la farindaĵoj kaj la fareblaĵoj.

Nur entuziasma homo povis sin ĵeti en tia batalo, nur nemalkuraĝebla viro povis daŭre labori « kontraŭ ventoj kaj tajdoj » al la celita stelo. Nur diplomateca klarvida viro povis gvidi tian aferon ĝis pli kvietaj akvoj. Tia viro estis Micard kiu, plie, tiel bone konis la homojn, ke li neniam postulis de ili pli ol ili povis fari, sed eltiris el ili pli ol ili mem sin kredis kapablaj fari.


Ni esperu, ke ĉiuj esperantistoj konscias pri la granda paŝo farita de la Esperantista movado dank'al Henri Micard.

Henri Micard estos omaĝita per speciala memoriga plato.

Sed vi ĉiuj povas montri vian intereson al lia kreaĵo per vizito al Grésillon en 1967.

Vi certe ne bedaŭros vian restadon ?


Nia programo estas preta. Vi povas de nun ĝin peti sendante respondkuponon.



***Mankos io en via Esperantista vivo
se vi ne vizitis Grésillon***

Niaj perantoj

- Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (39 aŭst. ŝil.).
- Belgujo** : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (70 fr.).
- Britujo** : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (10 ŝil.).
- Ĉeĥoslovakio** : S-ro Dezidero Koronczi, Nabrezie Metoda 1707/16, PRIEDVIDZA (1,50 us. dol.).
- Danlando** : S-ino Bodil Neergaard, Gothersgade 158, KOPENHAGO K (10 kr.).
- Finnlando** : S-ino Kerttu Väättänen, Mäntyläntie 4, LAPPEENRANTA 5 (6,2 mk.).
- Germanujo Okc.** : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr. 33, - pĉk. Frankfurt (M) 234-759 (5,6 mk.).
- Hispanujo** : S-ino Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1º, la, BARCELONO (77 pes.).
- Italujo** : Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO (840 lir.).
- Jugoslavio** : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (1260 d.).
- Nederlando** : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (5 guld.).
- Norvegujo** : S-ino Marit Delor, Oberst rodes veg. 56, LAMBERTSEDER (10 kr.).
- Pollando** : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (50 zl.).
- Svedujo** : S-ro Roland Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö pĉk. 157007 (8,4 kr.).
- Svislando** : S-ino H. Chavan, rue Etraz 16, LAUSANNE (7 sv. fr.).
- Tajlando** : S-ro C.L. Unchitti, GPO box 1231, BANGKOK (1,50 us. dol.).
- Usono** : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (1,50 dol.).
- Aliaj landoj** : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (20 st.) aŭ respondkuponoj (12 respk.), per libroj aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al la Direktoro.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncintajn

Akceptas :

- Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
- Por eklerni aŭ plilerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;
- Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo